

# PENSEO

*N-ro 352*

*feb. / 2021*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Wally du Temple (Kanado)



### Mortletero Skizita Nigre

#### *Pri Ĝisela Braŭn*

Kiam juna mi svatis amikinojn distance  
Maloportune por tuŝi dum en ritmo dance,  
Manskribis amleterojn pere de Esperanto  
La lingvo Internacia kiel edzperanto.

Anticipa promeno plezuris al poŝtkesto.  
Ĉu de Olga, Ĝisela, Ann aŭ Kloklo pri festo,  
Detaloj pri rendevuoj sed kongresprivataj  
Ĉu fotoj kun la notoj pri agoj amrilataj.

La leterkesto sidis sur apudvoja fosto,  
El ligno de arbaro, Kanada sovaĝforsto.  
Narcisoj flavaj kreske ridetis primavere.  
Koro kaj miaj sonĝoj imagis prisomere,

Kiam instruisto havas libertempon vagan.  
Mi jam faris planon, atendas konsenton ŝian.  
Tegmenton, plankon kaj porton havis tiu kesto  
Por ambirdoj vere estus hejmaloga nesto.

La pordon mi malfermis, koverton vidis unu.  
Adreso Frankfurta, pri mia 'Ĝisela' sunu.  
Sed strange preslitere vortoj majuskle aferas,  
Kiel burokrata dokumento; pensoj sferas.

Dikrando enkadrigas la etikedsurfacon.  
La koloro nigra aĉplenigas ties spacon.  
Fingroj impete sed nevole disŝire servas,  
Elpaki kion ŝia frato prov-advokatas.


Kondolencoj kaj detaloj pri tre aĉa murdo.  
Frenezulo mortpafis Ĝiselon sur la strato.  
Ŝi hejmon celis post koncerto, 'Brahms'  
Rekviemo.

Maniulo murdis ŝin por groŝa tantiemo.

Polico trovis inter roboj de ŝi koncertaj  
Kortuŝan taglibron, notoj al mi apertaj.  
"Mi iras nun al mia koncerto plej ŝatata,  
Konfesas pri mia sonĝo rave sopirata,

Tuŝapude kunesti en 'Elsinor' Danlando,  
Amindumi sur arĝenta sablo, tia strando.  
Tranokti kun vi en mia lito, kaj sopiru,  
Ke vi restu kaj neniam per trajno foriru."

Malĝojo, emocia aflikto min kripligis.  
Nenia kondolenco nek fortbrando mildigis  
Miajn angorojn ĝis mi aŭskultis fatalisme  
Al rekviemo levi ŝin de mi Optimisme.



## El Konsiloj de la Indiĝenaj Saĝoj

Se renkontas kornikon al kialo ne strebu.  
Vin vizitas transformiga estulo, akceptu.  
El nigra nenio venos feliĉa hazardo.  
Estu silenta, ne cerbe enketu per ardo.

Restu pigre, milde kiel senagaca mielo.  
Korniko jen koloro de la nigra ĉielo.  
Ĝi la malluman mondon nefizikan travivis  
Ĉe rando de la tempo alie konsciigis,

Kie potencoj aliformiĝas nefizikaj.  
 Fluganta ĝi sinkronis kun la scioj mistikaj.  
 Dumnokte aŭskultis apud silentfluga strigo.  
 Atendis blinde por alĥemia aperigo

De sekretoj por estuloj akva, tera, fluga.  
 Korniko havas sekretojn por vekigo homa.  
 Sed li, trompanto, certe rivelos ŝercoblikve  
 Meditu ritme dum muziko spurĉetas akve.

Estu silenta, ne cerbe enketu per ardo.  
 El nigra nenio venos feliĉa hazardo.




## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Kiel aero povas esti la feliĉo  
 Enspiras ni, ne povas plene spiri,  
 Ĝi kuratinge sekvas, ne rapidas,  
 Aŭ povas nur por temp' eniri.  
 Kiel la neĝo povas esti la feliĉo  
 Varmigos suno, ĝi degelos,  
 Eĉ ne sukcesos senti, ĝui  
 Ĉu estis ĝi? Ni ne komprenas.  
 Kaj eble dum la jaroj longaj  
 Esperas trovi la feliĉon,  
 Sed sur manplatoj nur pecetoj,  
 Restaĵ' de revoj luksaj, riĉaj.  
 Demandoj, pensoj, rememoroj  
 La agoj, vortoj, kiu kulpas?  
 Sed la feliĉo malliberan vicon  
 Denove trovas kaj okupas.

## Sirik Slagmu (Francio)



*La Morto kaj La Honto*

Alvenis la ventego matene tre frue,

Vestite nigre kun vualo de Morto;  
 La Natur' ekmiris restante sen vorto,  
 Pro miloj da fajroj falante ĉielen.  
 La Tero ekbrulis pro la bombardo;  
 La soldat' elsaltis bono kompreninte,  
 Ke la milito komencis sen deklaro;  
 Kontraŭ l' aroganta malamik' kruele.  
 Kvardek kvar tagoj senĉese daŭris  
 La detruado de la lando d' Armeno,  
 Tiu Paradizo sur la Sankta Ĝardeno,  
 Sed Armeno batalis kuraĝe sen timo.  
 Juna soldato sentime venkis Morton,  
 Por sia patrino kaj ŝatata Patrolando,  
 Kontraŭ malamiko alveninte el Infero,  
 Por kapti kaj neniigi Armenan popolon!  
 De kien povis scii la armenjuna soldato  
 Ke post kelkaj tagoj "finiĝos" la milito,  
 Kun malhonta kapitulac' por tuta popolo  
 Iu-ajn ludante politik' ludojn kun malamiko...  
 Okupado de la Sankta Tero komencis  
 Kun detruado de katedral' kaj statuoj,  
 Malamiko rikanis kaj mokis Armenon,  
 Sen pensi! Baldaŭ la Ter' brulus  
 sub siaj malpuraj piedoj!

11/11/2020

## Neĝas...sur la Libereco!

Alvenis la vintro kun frostoj nekredible,  
 Falis la neĝo, la teron blanke farbinte,  
 Eliris geinfanoj surstrate por ludi gaje,  
 Sed oni ne povis neĝbatali sinmaskinte.  
 Senteble, ke l' aero ne klaris, kiel kutime,  
 La vetero ŝajnis por tuthomaro tristege,  
 Kial maltrankvilon ĝi alportis, senespere  
 Frapinte fenestron kun kurtenoj vestite...  
 Miloj da serĉoj de mildaj sonĝoj rompiĝis,  
 Kaj la Suna kadrano la vintron ŝanĝigis.  
 Eĉ la ridetoj malaperis en nebulo de vintro,  
 Nur ekvideblis la Ter' kvieton en Natur-libro,  
 Neĝas! Neĝas sur la mondo preskaŭ dormanta,  
 Neĝas sur la vera flanko de la paco sinkaŝanta,  
 Neĝas sur la ĝojec'...kaj Sunradioj deprimas,

La librec' de la homar' iom post iom  
pereas...

19/01/2021

## Siv Burell (Svedio)



### Ŝpari aŭ forĵeti?

Ŝpari, ŝpari  
fine estos peze.  
La objektoj posedas vin.  
Sed kiu povas forĵeti  
memoraĵojn,  
donacojn,  
kartojn de florbukedoj,  
kristnaskajn –  
kaj novjarajn kartojn.  
Imagu, se la doninto demandus  
pri io!

### Inaŭguro

Polurita surfaco  
novaj seĝoj  
en ĉiu spaco,  
elegantaj jupoj.

Tiel ni vidas nin  
en la laborejo.  
Ni klientojn ne invitis  
ni ilin tute ja evitis  
sed akceptis centojn de altranguloj.

Kostas multe!  
Kie ni metas la energion  
sur klientoj aŭ sur ni mem?

## Wel CR (Brazilo)



### NOVA M

Novan jaron,  
kun ridoj,  
de ĉiuj:  
junaj,

beboj,  
maljunaj.

Mi volas novan jaron kun pensoj plej nunaj.  
Pensojn leĝere flugajn mi volas,  
plenajn de sunradioj,  
ĉenokte arĝentajn pensoj mi volas por ludi kun  
mi enĉambre...

Mi ja volas esti ĉi luma amika ulo  
aŭ nura sablero plaĝa ...

( Mian renovon ĉiam al mi donos,  
re kaj re,

la suno,

la luno

kaj la tajdo ...

Kion pli mi povos do deziri ?...

Nur lasi ke la mondo ja surtretu min laŭvole )

Kion pli mi povos do deziri ?...

Nur lasi ke la mondo surtretu min laŭvole )

## Cecília Meireles (1901 –1964 )

### LA DOLÇA KANZONO

Mian suferon mi kantis,  
dolĉan donis al ĝi vorton,  
serenon de kiu ĉantis,  
ke en ĝi Di' trovis forton  
de kiu feliĉon plantis .  
En ekstazo lirangeloj  
por moment' en aprezklino  
— ja pro mia voĉrafino —  
kun samaj teraj anheloj,  
min enviis sen difino .  
Mi vekis ulojn en dormo,  
mortintojn mi suspirigis.  
El la buŝo ĝojenormo,  
ĉielarka post la ŝtormo,  
vivon al sonĝo finligis .

Mia kanto ja mistero  
iĝis al vi kaj al Dio.  
Kia rava plorafero :  
ĉiuj sorĉe sur la tero,  
mi nur, ve, en agonio !  
Pro la dolĉa sinprezento  
de mia sufer' en verso,

ĝin igu Di' testamento,  
ke plu povu l' Universo  
el ĝi trinki ĝis kontento !

*Elportugaligis*

## Wel CR (Brazilo)

## Jadranka Miric (Serbio)



## Ampelerino

Viaj manoj kiel pianoklavaro  
kun koro mia lude dancas.  
Al anim' trankvilecon donas!  
Sub ampelerino kaŝis sin tenera kisaro.  
Pro tiom da feliĉo anim'mia  
ne permesas forgesi al mi  
la somerferion kiun vi  
donacis al koro mia!  
Tial kiam horloĝmontriloj  
la noktmezon tiktakos  
per glaso da ĉampanjo ni tostu  
al senhejmuloj, al malfeliĉuloj!



## Steletaj neĝeroj

Blankaj neĝaj spuroj  
sur viaj nigraj haroj  
brilas ĉi -nokte silvestre,  
dum vento muzikas majstre!  
Batas riverondar'  
kruele, forte al la ŝtonar'  
kien vi forjetis ringon  
puŝante min en amokirlon!  
Dum ploranta animo  
suferas, vian foton kuŝa en mia sino  
ŝirita je miloj da pecetoj,  
kovrita kun miloj da neĝeretoj!  
Sur riverbordo nokto kaptis min.

Frostiĝis mi kiel neĝohomo.  
Tiom gajnis mi de via ampomo!  
Luno kompate brakumas min !

## Memoroj

Iam en mia infaneco  
venis Karuselo, laŭmemore  
el apuda najbareco,  
je infana ĝojo, tutkore!  
Staris ĝi sur la altaj'  
kvazaŭ sceno eltirita el fabela mirindaĵ',  
ĉirkaŭata de verda pinar'.  
Nune tie konkuradas nur ĉevalar'.  
Luladis ni alten  
gaje al la blanka nubar'.  
Foje preskaŭ tuŝante teron  
foje ŝvebante aeren kun amikar'.  
Infanaĵ bruaj kriaĉoj  
miksitis sin kun oftaj aŭdataj riproĉoj  
de la ĉeestantar'. Iliaj malicaj reagoj  
okazitis pro iliaj troaj zorgoj!  
Tiun someron infane luladis ni.  
Iuj vomis, iuj ridis kantante, iuj falis  
hazarde.  
Tamen ĉion ni faris korarde.  
Juneco restis karmemore al mi!

## Mimoza Ahmeti



## Grandioza horo

Grandioza horo, via homo freneziĝis,  
Li ne konsoliĝas, nek ofendiĝas, nek ploras.  
Ne reagis, nek sentas, nek moviĝas.  
Restas ŝtonigita kaj la manoj  
Li tenas ligitajn.

Grandioza horo, via homo finiĝis,  
Dum la suno per varmo la planedon atakis,  
Dika, idiota, viskoza suno.

Grandioza horo,

Foriru, frapu, kuru dum sekundo,  
malpeza, flugema, pupo...  
Ĉu vi scias ke via grandiozeco  
Estas ĉi tiu senbuŝa homo,  
Restanta ŝtoniĝinta,  
Kiu digni ne plu kapablas,  
Pro la terura denseco de la sorto  
En sia impresoj,  
La idealan fadenon la sperto alfrapas.  
Kaj en ĉi tiu performiga paŭzo li staras  
Sub la altiro kaj premo de enrompa pezo.

Grandioza horo, ĉu vi scias kio estas la pezo?  
Multaj viroj naskiĝis pro ĝi  
Kaj mortis.  
Ŝtoniĝis via homo, svenis.  
Vi inerte dum la varmege tremetas.  
Eble morgaŭ denove malpeziĝas.

Grandioza horo,  
Via homo freneziĝis.  
Statika monstro kun sangumaj okuloj.  
Multan laciĝon en lia maso vi alpremis  
Kaj la ties stoman freŝecon vi elĉerpigis.

## Adiaŭ, sekaj virtoj

Puraj malvirtoj,  
Sub akuzoj, kun vi, oni ankaŭ min submetas.  
Normale mi ne ofendiĝas, mi al vi similas.

Ĉu vi ne estas  
Mia memo, kara  
Kiun mi aperigas  
Tiomfoje kiom mi hontiĝas?

Dio mia, tra la virtuo  
Pasas nur la moralo,  
Kia enuo...

Puraj malvirtoj,  
Ĉu estas viro, ĉu virino kiu kun vi ne iru,  
Ĉu estas infano, adoleskanto, abituriento,  
Ĉu estas brila maljuneco

Sen malvirta ĉenero?

(Jen, ankaŭ mi...kiel la ceteruloj,  
Trouzas, vagadas,  
En malvirto malpuriĝas...)

Lumigitaj kernoj de la sekiĝintaj virtoj  
Pro via malĉeesto.  
Kiu vin disigis, kiu vin pelis, kiu vin  
akuzis, malvirtoj?  
Kiu diris ke la krimo kaj la heroismo  
ne estas, esence, tiom tragikaj?

Kiu deŝiris la honoron disde la korpo,  
La perfidon disde la fideleco?  
Kaj kiu povas diri ke li sin detenis  
Tiom, kiom li sanktiĝis?

Ho homa spirito,  
Vi estas unu kaj ne disigebla  
Kiel la multvarieco...

*Elalbanigis*



**Bardhyl Senimi**  
(Albanio)

## El Ĉina Antikva Poezio

Huang Tingjian (1045-1105)

—laŭ melodio *Subigo de ŝtormo*

Ĉi-loke senĉese pluvadas  
ja kvazaŭ likiĝus ĉielo  
kaj fluas kotakvo surtere  
jen dum la tuttag' en malhelo.  
La domo, en kiu mi loĝas,  
skuadas jen kiel boato kun velo.  
Ĉe l' Fest' de Duobla la Naŭo\*  
ha, ĵuse serenaj nuboj vetero.  
Mi fole drinkadas orgie  
trans la montpasejo ĉe la Shu-rivero.

Ne moku min la kadukulon,

ankoraŭ mi tenas min je viglopleno.  
 Rigardu, ĉu tiuj maljunaj, kiel mi,  
 ja povus enŝovi flavfloron sen peno  
 en harojn sur vert' por ornamo?  
 Kaj ankaŭ impona kaj majstra poemo  
 naskiĝis sub mia skribil', malsupera  
 ne al la talentaj poetoj en versa ĝardeno.  
 Ankoraŭ mi povas arkpafi tre lerte  
 sur la galopanta ĉevalo sen ĝeno.  
 Mi montras bravecon, sagacon,  
 samkiel antaŭaj herooj en milit-areno.

*\*la naŭ-a de naŭa monato laŭ luna kalendaro*

—**laŭ melodio *Kora sento***

Jen ondon pelas ondo  
 sur vasta la rivero.  
 Fiŝisto olda kun ĉapelo  
 bambua kaj pajlomantelo  
 fiŝhokas ĉe boato.  
 Li havas fortan volon kun espero  
 sukcesi kapti fiŝojn spite al profundo  
 de akvo kaj malvarma la vetero .

La fiŝo glutas la logaĵon  
 kaj tuj ĝin vomas heziteme,  
 rifuzas kapti l' hokon,  
 naĝante ĉirkaŭ ĝi timtreme,  
 post longe ĝi hokitas tarde.  
 Sur frida akvo li reiras reme,  
 banite en lunlumo, flue inter  
 nigrverdaj montoj seriozmiene.

## Kong Pingzhong (?-?)

—**laŭ melodio *Mil aŭtunoj***

Sur bordo de la lago blovas  
 karese la printempa vento.  
 Mi sola en malplena ĉambro,  
 moroze kun ĉagrenturmento.  
 Makulas larmoj la kapkusenon,  
 jam malaperis de long-momento  
 la spiro de hejmloko pro restado longa  
 en fremda loko kun korŝira sento.  
 Ĵus siestinte, mi leviĝas kaj rigardas  
 papiliparon flirti sub tegmento.

Neniu donas atenteton  
 al ĉagrenuloj molakore.  
 Kaleŝon haltigas mi por  
 forsvingi afliktiĝon jen laŭvole,  
 sed naskas mi mornaĵojn novajn.  
 Mi jam ne povas ja de fore  
 mesaĝojn gajni kaj klepsidr' ellasas  
 sablerojn hor-post-hore.  
 Nun suno sinkas post la montojn,  
 malplenas ĉio blankkoloro.

## Zhu Fu (1048-?)

—**laŭ melodio *Fiŝista fiero***

Subtilas pluveto,  
 karesas zefiro.  
 Poploj, salikoj mergiĝas  
 en la pluvnebula trankvilo.  
 Malsekaj salikaj floketoj  
 ne povas pro akva altiro  
 dancflirti leĝere.  
 Ĉagrenoj kaj la hejmsopiro  
 jen svarmas en koron.  
 Pli bone forfluu ili per foriro  
 kune kun printempo  
 oesten rivere kun vea suspiro.

Sin trenas printemp' naŭ dek tagojn,  
 do, kiu ĝin povus plilongi laŭvole?  
 Eĉ se vi disipus ormonon,  
 jen pruvos sin via penad' senvalore.  
 Kunportu mesaĝon al la vinvendisto  
 ja en la bazaro de Dongyang parole,  
 ke mi tuj hodiaŭ drinkados  
 ĝis morta ebrio ignore.  
 Mi volas ĝojigi min eĉ en amaro  
 por ke mi ne larmu dolore  
 kiam mi ekhavas pasinton  
 ĉagrenan sur koron memore.

## Zhao Lingzhi (1051-1134)

—**laŭ melodio *Aŭguristo***

La printempa vento la unua  
 spronas umearbon flori ja kun peno.  
 Umefloroj fride belas

en sabloza akvo per vaz-teno.  
 Ili ne viciĝas kun aliaj floroj,  
 sed aspiras pavi en lunluma sceno.  
 Kun aromo delikata ili  
 sidas sur la vert' de knabino.  
 Post neĝado ilin la unuajn florojn  
 homoj ŝatas tre kun korinklino.

## Zhong Shu (?-?)

—*laŭ melodio Verdas salikpintoj*

Sur bord' sabloza verdas herboj.  
 Salikoj svingas kvaston en nebulo  
 ĉe l' loĝejo de regneŝtr' antikva.  
 La floroj suplas kaj aromas en ventlulo  
 post la severa vintra frostoj.  
 Printempa spiro jam montriĝas  
 jen sur pirfloroj kun plezuro.

Vaganto sola en boato  
 kiu veturas trae sub ĉielo,  
 vekiĝas el vinebriiĝo  
 kaj vidas korvojn en aero  
 tumulte flugi kaj vesperan sunon.  
 Ekstere de la dom' pendolo kun leĝero  
 svingiĝas kaj videblas belulino.  
 Jen kies korto montras scenon de mielo?

*Elĉinigiŝis*



**Veĵdo (Ĉinio)**



**Zhuangzi**

**ĈAPITRO DUDEK-KVARA**

**Xu Wugui**

§24-01

Per la prezento de Ru Shang, la ermito Xu Wugui havis aŭdiencon de la markizo Wu de la regno Wei. La markizo Wu simpatie diris al li:

“Kian mizeran vivon vi vivas! Mi supozas, ke vi volas vidi min pro tio, ke vi ne plu eltenas la malfacilecon en la montaj arbaroj.”

“Estas mi, kiu devas vin konsoli,” diris Xu Wugui. “Kial do vi devas min konsoli? Se vi satigas ĉiujn viajn dezirojn kaj avidojn kaj pliigas viajn ŝatojn kaj malŝatojn, tiam vi vundas vian denaskan naturon. Sed se vi forigus ĉiujn viajn dezirojn kaj avidojn kaj forlasus viajn ŝatojn kaj malŝatojn, tiam vi kaŭzus suferojn al viaj oreloj kaj okuloj kaj ne plu ĝuus tiom da plezuroj. Tial devas esti mi, kiu vin konsolas. Kial do vi, kontraŭe, min konsolas?”

Aŭdinte tion, la markizo Wu aspektis malgaje kaj faris nenian respondon.

Post kelkaj momentoj Xu Wugui ree diris:

“Permesu al mi, ke mi diru al vi, kiel juĝi la hundojn. Hundoj de malsupera kvalito, kontentiĝas je kaptado de sia predo kaj satmanĝo, same kiel sovaĝa kato; hundoj de meza kvalito ŝvelas de aroganteco, ĉiam rigardante supren; hundoj de supera kvalito estas liberaj kaj senzorgaj, kvazaŭ forgesante sian propran ekzistadon. Sed mi juĝas la hundojn ne tiel bone, kiel mi juĝas la ĉevalojn. Kiam mi juĝas la ĉevalojn, se ili galopas tiel rekte, kvazaŭ sekvante la linion faritan per inkmarkilo de ĉarpentisto, tiel kurbe, kvazaŭ sekvante la kurbon faritan per kurbilo, tiel rektangule, kvazaŭ sekvante la linion faritan per ortilo, kaj tiel runde, kvazaŭ sekvante la cirklon faritan per cirkelo, tiam mi diras, ke ili estas la plej bonaj ĉevaloj en la lando. Sed ili ne estas inter la plej bonaj ĉevaloj en la mondo. La plej bonaj ĉevaloj en la mondo estas dotitaj per naturaj talentoj. Ili ŝajnas distriĝemaj kaj melankoliaj, kvazaŭ ili forgesus sian propran ekzistadon. Ili povas superi ĉiujn aliajn ĉevalojn kaj galopas tiel rapide, ke ili malaperas el la homa vidkampo en palpebruma daŭro.”

La markizo estis tiel ĝoja, ke li ekridis.

Ru Shang diris:

“Kiel do vi tiel ĝojigis nian suveremon? Mi penis ĝojigi lin per citaĵoj kiel el tiaj klasikaj libroj, kiaj estis *Libro de Poezio*, *Libro de Historiaj Dokumentoj*, *Libro de Ritoj*, *Libro de Muziko*, tiel ankaŭ el militaj libroj, kiaj estis *La Oraj Tabeloj* kaj *La Ses Strategioj*. Mi faris sennombrajn proponojn, kiuj kondukis al grandaj sukcesoj, sed la markizo neniam ridis. Kion do vi diris al li, ke li tiel bonhumoriĝis?”

“Mi rakontis al li nur pri mia juĝado pri hundoj kaj ĉevaloj,” diris Xu Wugui.

“Ĉu nur tiele?” demandis Ru Shang?

“Ĉu vi ne aŭdis pri tiuj, kiuj estis ekzilitaj en la regnon Yue? Post kelkaj tagoj ekde sia ekziliĝo ili ĝojis pro vido de siaj konatoj; post deko da tagoj aŭ monato ili ĝojis pro vido de iu ajn el tiuj, kiujn ili antaŭe renkontis; post unu jaro ili ĝojis pro vido de iu ajn, kiu aspektis kiel ilia samregnano. Ju pli longe ili estis for de sia naskiĝlando, des pli profunde ili deziris vidi siajn samregnanojn.

“Jen alia ekzemplo: iam iu homo forkuris en la sovaĝejon, kie altaj herbaĉoj invadis kaj blokis la forlasitajn vojetojn, kiujn frekventis nur musteloj. Ĉar longatempe li izolite loĝis tie, tial ĉiufoje, kiam aŭdis homan piedbruon, li tuj pleniĝis de ĝojo, por ne paroli pri la aŭdo de paroloj kaj ridoj de siaj fratoj aŭ gepatroj, kiuj venus al li! Nun jam tro longatempe nia markizo ne aŭdis sincerajn parolojn de veraj homoj!”

#### §24-02

La ermito Xu Wugui iris vidi la markizon Wu, tiu diris:

“Vi loĝas en la profundaj montaj arbaroj, manĝante glanojn kaj sovaĝajn fruktojn kaj nutrante vin per tubocepaj kaj ŝenoprazoj, kaj estas for de mi jam tre longatempe. Jen vi jam maljuniĝis! Ĉu vi venas por gustumi mian vinon kaj mian viandon aŭ por bonvole alporti benon al mia regno?”

Post kiam Xu Wugui retiriĝis el la palaco, “Mi naskiĝis malriĉa,” respondis la ermito, “kaj mi neniam nutras la deziron ĝui vian vinon kaj vian viandon. Mi venas ĉi tien por montri al vi mian konsolon.”

“Kio? Vi venas ĉi tien por montri al mi vian konsolon?” diris la markizo Wu.

“Mi venas ĉi tien por prezenti mian konsolon al via korpo kaj via animo,” diris Xu Wugui.

“Kion do vi volas diri per tio?” demandis la markizo Wu.

“La ĉielo kaj la tero donas la egalan nutron al ĉiuj estaĵoj de la mondo,” respondis Xu Wugui. “Tial tiu, kiu estas sur alta loko, ne devas opinii sin supera kaj sekve ĝui la avantaĝon; tiu, kiu estas en malalta loko, ne devas opinii sin malsupera kaj sekve suferi malavantaĝon. Kiel la sola reganto de tiu ĉi granda regno, vi sklavigas vian popolon por kontentigi vian avidon de viaj oreloj, okuloj kaj buŝo, dume via menso ne aprobas tion kaj sekve vi estas en maltrankvilo. La menso amas la harmonion kaj malamas la egoismon. La egoismo estas malsano. Jen kial mi venas ĉi tien por prezenti mian konsolon al vi. — Sed, kial do fariĝas tiel, ke vi sola suferas tiun ĉi malsanon?”

“Jam longe mi deziris vidi vin kaj aŭdi viajn konsilojn. Mi volus ami mian popolon kaj meti finon al la milito pro la justeco. Ĉu laŭ vi tio estas farinda?”

“Ne, tio ne estas farinda,” diris Xu Wugui. “Ami la popolon estas la komenco de ruinigado de la popolo. Fini la militon por praktiki la justecon estas la radiko de komenco de la militado. Se vi komencos per tiu ĉi bazo, vi apenaŭ sukcesos, ĉar ĉia penado krei bonan famon estas la ilo por fari malbonon. Kvankam vi praktikas la humanecon kaj la justecon, vi tamen en efektiveco praktikas hipokritecon, ĉar ĉia bela ŝajno nepre kondukos al la hipokriteco. Se vi sukcesos, vi certe fanfaronos pri via sukceso; se io iros



malbone, vi certe komencos militon. Vi ne vicigu viajn soldatojn antaŭ la fortresoj, nek paradigu viajn pied- kaj rajdosoldatojn en la korto de via palaco; vi ne nutru avidon kontraŭracian, nek venku aliajn per malsinceraĵoj, per ruzaĵoj aŭ per ĉiam militaj rimedoj. Se vi buĉos la soldatojn kaj la popolanojn en aliaj regnoj kaj proprigos al vi iliajn terojn por pliigi viajn riĉaĵojn kaj kontentigi viajn avidojn kaj vian egoisman ambicion, mi ne scias, kia bono sin trovos en tia milito kaj kia senco sin trovos en tia venko. Vi preferu agi ne tiel kaj kulturi sincerecon en via koro, por ke vi konformigi vin al la naturo anstataŭ ĝin malordigi. Kiam la popolo estos ne plu minacata de la morto, kian bezonon do vi tiam havos por fini la militon?"

*Elĉinigis*



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

# Ĉineske

**Yanke (Ĉinio)**

## Sopiremo al printempo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Ĉi-vintre  
vivas mizere  
mi jen en izoleco  
kontraŭ virus' konkere  
kvaz' enbotele.

En ĉelo  
mi paŝas sola  
sen amik', sen karulo  
sen parolo konsola,  
sen vort' elkkora.

Rigardas

mi tra fenestro  
domojn, homojn ĉirkaŭe,  
volvita per vat-vesto,  
ve, sen protesto.

Ululas  
ekstere vento  
kvazaŭ fantomo ploras.  
Plias soleca sento  
en ĉi momento.

Mi legas,  
legadas nure  
por min distri modere,  
vage pensi nebule,  
vivi plezure.

Mi dronas  
jen en komtemplo  
pri la libera spaco,  
pri la varma printempo,  
pri l' ĝoja tempo.

**Jadranka Miric (Serbio)**

## Denove neĝas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Ekflugis  
la blanka plumar'  
de sur ĉielo. Mira  
blanka ĉielo. Flokar'  
sur nigra harar'.

Neĝeroj  
glitis malsupren  
laŭvizaĝe milde. Jen  
refluganta aeren  
ŝvebanta alten!

Blankiĝis  
stratoj kaj arbar',  
tegmentoj kaj fumtuboj.  
Samas urbotiliar'

kaj alta montar'.  
 Ekstere  
 grundo frostiĝis.  
 Regas vintra freŝeco.  
 Mia spir' vaporiĝis  
 Pinar' glaciĝis!

Frapetis  
 neĝeraj gutoj  
 sur fenestron miksitaj  
 kun pluvo. Neĝokrioj  
 " fi flokovivoj!"

*\*Sopir-al-sudo: ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj  
 de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

## Sero (Ĉinio)

### Vundita Birdo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo\*

Sur  
 branĉ' vidiĝas la kontur'  
 de birdo  
 en pluva nebul'.

Ĝi,  
 vundita kun trista kri',  
 pepadas  
 kvaz' en agoni'.

Ĉu  
 bub' per katapulto, nu,  
 ĝin vundis  
 por amuza ĝu'?

Ve,  
 ne venas al mi ide'  
 por savi  
 ĝin de la pere'.

Pli  
 bone, do, forflugu ĝi  
 al kara  
 la birda soci'.

*\*Dekses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj  
 de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

## Fratoj Grimm

### Pri ruza tajloreto



Estis iam reĝidino tre fiera. Kiam venis fianĉo, ŝi metis al li enigmon, kaj se li ne povis solvi ĝin, oni forsendis lin kun moko. Ŝi ankaŭ heroldigis, ke tiu, kiu solvos ŝian enigmon, geedziĝos kun ŝi, egale, kiu li estas. Fine ankaŭ kunvenis tri tajloroj, el kiuj la pli maljunaj opiniis, ke ili jam faris sufiĉe da lertaj kudreroj kaj ĉiam trafis la trueton. Tial ili ankaŭ en tiu kazo devus trafi la celon; la tria el ili estis malgranda sentaŭgulo kaj senzorgulo, kiu eĉ ne regis sian metion. Sed li opiniis, ke tiukaze Fortuno devos helpi al li, ĉar de io ja devos veni la bonŝanco. Jen la du aliaj diris al li: „Restu nur hejme! Vi ne multe atingos per via limigita menso.“

Sed la tajloreto ne lasis konfuzigi sin kaj diris, ke la ideo jam fiksiĝis en lia kapo, kaj ke li certe iel eltorniĝos, kaj li iris antaŭen kvazaŭ la tuta mondo apartenus al li.

Tial la tuta triopo anonciĝis ĉe la reĝidino kaj diris, ke ŝi metu sian enigmon al ili, ĉar venis per ili la ĝustaj homoj, kiuj havas mensojn tiajn fajnajn, ke oni certe povus tiri la mensojn tra kudriltrueto.

Jen diris la reĝidino: „Mi havas du specojn de haroj sur la kapo, kiujn kolorojn ili havas?“

„Se vi demandas nur pri tio“, diris la unua, „ili certe estas nigraj kaj blankaj kiel tolo, kiun oni nomas „Karvio kaj Salo.“

La reĝidino diris: „Malĝuste divenite, la dua respondu!“

Jen diris la dua: „Se la haroj ne estas nigraj kaj

blankaj, ili estas brunaj kaj ruĝaj, kiel la dimanĉa vesto de mia patro.“

„Malĝuste divenite“, diris la reĝidino, „la tria respondu, mi jam vidas, ke li certe scias tion.“

Jen la tajloreto kuraĝe paŝis antaŭen kaj respondis: „La reĝidino havas arĝentajn kaj orajn harojn sur la kapo, tio estas la du diversaj koloroj.“

Kiam la reĝidino aŭskultis tion, ŝi fariĝis pala kaj pro ektimo preskaŭ falis planken, ĉar la tajloreto trafis la celon. Kaj ŝi firme pensis, ke neniu homo surtere kapablas trovi la solvon. Kiam ĝia koro retransviliĝis, ŝi diris: „Per tio vi ankoraŭ ne gajnis min, vi ankoraŭ devos fari la sekvan: malsupren en la stalo troviĝas urso, ĉe tiu vi devos pasigi unu nokton; kiam mi matene leviĝos, kaj vi ankoraŭ vivos, vi rajtos edzinigi min.“

Sed ŝi pensis, ke per tio ŝi liberigos sin de la tajloreto. Ĉar la urso lasis vivi ankoraŭ neniun homon, kiu troviĝis en ĝiaj ungegoj. La tajloreto ne lasis timigi sin, li estis tute plezurigita kaj diris: „Komenco freŝe bone – labor’ finite jam duone.“

Kiam vesperiĝis oni kondukis la tajloreton malsupren al la urso. La urso tuj volis ataki la malgrandan ulon kaj bonvenigi lin per ungegobato.

„Malhaste, malhaste“, diris la tajloreto, „mi ja trankviligos vin.“

Li tiris tute sen hasto, kvazaŭ la afero ne rapidegus, kuriozajn fremdajn nuksojn el la poŝo, per la dentoj malfermis ilin kaj manĝis la kernojn. Kiam la urso vidis tion, ĝi ekhavis apetiton kaj ankaŭ volis havi nuksojn. La tajloro elpoŝigis manplenon da ili kaj transdonis ilin al la urso; sed ne estis nuksoj, sed rokaj ŝtonetoj. La urso metis ilin en la buŝon, sed ĝi ne povis rompi ilin, kiom ajn ĝi mordis ilin perdente.

„Hehe“, li pensis, „kia ŝtipkapulo mi estas! Eĉ la nuksojn mi ne povas disrompi.“ Kaj li diris al la tajloreto: „Nu, rompu la nuksojn per viaj dentoj.“

„Jen pripensu, kia ulo vi estas“, diris la tajloreto, „vi havas tiom grandan buŝegon kaj tamen ne povas rompi eĉ nuksetojn.“

La tajloreto prenis la ŝtonetojn, rapidis, metis anstataŭ ŝtoneto nukson en la buŝon kaj krak, ĝi estis disrompita.

„Mi ankoraŭfoje devos provi la aferon“, diris la

urso, „se mi vidas tion, mi pensas, ke ankaŭ mi povus fari tion.“

Jen la tajloreto ankoraŭfoje donis ŝtonetojn al li, kaj la urso laboregis kaj mordadis per ĉiuj makzelaj fortoj sur ilin. Sed kiel certe la leganto jam imageblis, li ne kapablis tion. Kiam tiu afero estis finita, eltiris la tajloreto violinon el la jupo kaj ludis melodion sur ĝi. Kiam la urso ekaŭdis la muzikon, li ne povis rezisti kaj komencis danci, kaj kiam li jam dancis dum certa tempo, la afero plaĉis al ĝi tiom, ke ĝi diris al la tajloreto: „Aŭskultu, ĉu la ludado de violono estas malfacila?“

„Infanece simpla, rigardu, per la maldekstra mano mi surmetas la fingrojn kaj kun la dekstra per la arĉo mi freŝe ludadas sur ĝi, tio iras gaje, hopla, vikle kun hurao!“

„Tiel violoni ankaŭ mi volus“, diris la urso, „por povi danci tiom ofte, kiom mi volas. Kion vi pensas pri tio? Ĉu vi instruos min?“

„Elkore volonte“ diris la tajloreto, „se vi havas talenton, sed montru foje viajn ungegojn, ili estas terure longaj, mi devos iom printranĉi ilin.“

Jen oni alportis lignajistan vajcon; kaj la urso intermetis siajn ungegojn. Sed la tajloreto fermŝraŭbis ilin kaj diris: „Atendu, ĝis kiam mi estos alportinta la tondilon.“

Li lasis muĝi la urson tiom longe, kiom li volis, sin mem li kuŝigis en angulon sur pajlofasko kaj ekdormis.

La reĝofilino, kiam ŝi vespere aŭdis terure muĝi la urson, estis konvinkita, ke li grumbas pro ĝojo, ĉar li finis la vivon de la tajloreto. Je la sekva mateno ŝi leviĝis tute senzorge kaj plezure, sed kiam ŝi rigardis al la stalo, staris la tajloreto tute vikle antaŭ ĝi kaj estis sana kiel fiŝo en la akvo. Tial ŝi ne plu povis diri eĉ vorton kontraŭ li, ĉar ŝi ja publike promesis la geedzecon. Kaj la reĝo alvokis kaleŝon, en tiu ŝi devis veturi kun la tajloreto al la preĝejo por la geedziĝo. Kiam ili jam enkaleŝiĝis, iris la du aliaj tajloroj, kiuj havis hipokritajn korojn, kaj ne pretis lasi al li lian feliĉon, en la stalon kaj liberigis la urson el la vajco. La urso plena de kolero postkuris la kaleŝon. La reĝidino aŭdis, kiel li muĝas kaj grumbas, kaj ŝi ektimis kaj vokis: „Ve,ve, la urso persekutas nin kaj

volas nin disŝiri.“

La tajloreto estis rapida, li starigis sin surkape, etendis la gambojn el la kaleŝo kaj vokis: „Ĉu vi vidas la vajcon? Se vi ne retiriĝos, mi denove firmŝraŭbos vin.“

Kiam la urso tion aŭskultis, ĝi turniĝis malantaŭen kaj forkuris. Sed la tajloreto nia tute trankvile lasis veturigi sin al la preĝejo kaj la reĝofilino fariĝis lia edzino. Li vivis kun ŝi kun plezuro kiel erikeja alaŭdo. Kaj tiu, kiu ne fidis al mi, devos pagi taleron.

*Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Vom klugen Schneiderlein“*

tradukis



**Dorothea kaj  
Hans-Georg Kaiser  
(Germanio)**

lingve kontrolis **Vladimir Türk**

## Jia Pingwa (1952-)

### Rememoro pri mia patrino

Kiam mia patrino vivis, ŝi okupiĝis pri diversaj aferoj, ne zorgante pri pasado de tagoj kaj noktoj. Sed post ŝia morto la tagoj forpasis nerimarkite. Laŭ kalkulo, post dudek tagoj estos ŝia tria mortdatreveno.

Antaŭ tri jaroj, ĉiufoje kiam mi ekternis, mi ĉiam diris: “Kiu ekpensas pri mi?” Mia patrino, kiu estis serĉema, sekvis miajn vortojn: “Kiu? Via panjo.” Dum ĉi tiuj tri jaroj, mi tre ofte ternadas. Kiam mi maltrafis la tempon por manĝado aŭ vigilis tra noktoj sinsekve, mi ternadis kaj je ekterno, mi ekpensis pri mia patrino, konsiderante, ke ŝi sopiras al mi. Ofte kiam mi skribas, mi aŭdas ŝin voki al mi kvazaŭ reale. Je ŝia intima voko mi kutime turnas mian kapon dekstren. Antaŭe ŝi emis sidŝi ĉe la litkapo en la ĉambro ĉe dekstra flanko. Kiam mi komencis skribi super la tablo, ŝi ĉesis moviĝi sen paroli, sed ŝi jetis rigardon al mi de tempo al tempo. Post longa tempo da rigardado ŝi eligis vokon al mi kaj diris: “Ĉu vi povus finskribi ĉiujn vortojn en la mondo? Eliru dum momento.” Nun kiam mi aŭdas ŝian vokon, mi eniras tiun ĉambron, dubante, ĉu ŝi alvenis al Xi’an de la

urbeto Dihua. Kompreneble ekzistas neniu en la ĉambro, sed mi staras tie longan tempon, parolante al mi: “Panjo jam eliris por aĉeti verdajn paprikojn kaj rapojn, kiujn mi tre ŝatas manĝi.” Eble ŝi volus min amuzi kaj intence kaŝi sin en la fotojn pendantajn sur la muro. Do, mi bruligas incensstangetojn en la incensujo antaŭ tiuj fotoj, kaj diras: “Mi ne sentas min laca.”

Mia patrino estis ordinara virino kun vinditaj piedetoj, kiu estis malklera kaj kies domicilo estis registrita en la kamparo, sed ŝi estas tiom grava por mi. Kvankam jam forpasis longa tempo kaj mi ne plu maltrankvile zorgas pri ŝia malsano, tamen, kiam mi afervojaĝas malproksimen kaj neniu plu babileme alparolis min pri tio kaj alio, mi estas konfuzita, al kiu mi sendu la frandaĵojn, kiujn mi ekhavas.

En la ĉambro, kie mia patrino loĝis en Xi’an, mi tenas ĉiujn meblojn netuŝitaj, aranĝitaj kiel antaŭe, sed mi ne plu vidis ŝian figuron tie. Fojfoje mi korŝire diras al mi mem: “Mia panjo ne mortis. Ŝi loĝas en la hejmloko en la kamparo.” Ĉijare la somero estas tro humida kaj varmega. Ĉiunokte, kiam mi vekiga pro humida varmega, mi trance ekpensas, ke mi devas anstataŭigi la malnovan klimatizilon per la nova en ŝia ĉambro. Kiam mi tute sobriĝas, mi konsolas min: “La nova domo en la kamparo, kie mia patrino loĝas, devas esti varmeta kaj friska.”

Ŝia tria mortdatreveno alproksimiĝas tagon post tago. Laŭ la moro de la loka kamparo oni devas okazigi ceremonion por tiu tago. Mi aĉetas incensstangetojn, kandelojn kaj ofermanĝaĵojn kaj pretas reiri al Dihua. Sed kiam mi reiros al Dihua, mi devos viziti ŝian tombon. La reala fakto diros al mi, ke mia patrino vere mortis, kaj ni ambaŭ apartiĝas de du mondoj, mi sur la tero kaj ŝi sub la tero. Estas neeble por ni renkonti unu la alian. Ĉe tio mi esploras longaspire kun larminundo.

### Elĉinigi **Fangfang (Ĉinio)**



Eldonas Redakcio de **Penseo**  
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)  
Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)  
[www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm](http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm)

